5-a Jaro
N-ro 5 (25).

Januaro 1931
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA. MOKA

Redaktoro: WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO:

S. **Joannes Chrysostomus**, Preĝo por la Paco. — **Manifesto kontraŭ deviga militservo kaj milita edukado de la junularo.** — **Papoj kontraŭ deviga militservo.** — **Wilhelm Solzbacher**, Milito kaj Paco. — **Marcel Laloire**, Blankaj kaj Flavaj Homoj. **Sankta Augustinus**, Ŝtatoj kaj Rabistaj Bandoj. — **W. S.**, **Internacia Junulara Agado** (2. Protestanta kaj Ortodoksa Junularo. 3. Alireligia Junularo. 4. Studenta Junularo). — **Nia Movado.** — **Sur Nia Librotablo** (Cosmopolis kaj Teilopa. — Herooj de la Glacio. — Libroj pri la Milito. — Libroj pri la Paco. — Novaj Esperanto-Gazetoj).

REDAKCIO: **Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.**

Eldonejo: ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO, Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germ. (Regina Reiff).

Presejo: Imp. DISONAISE, S. Wigandy, Dison. Tel. 1398.

# Abonprezoj de “La Juna Batalanto„

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3.40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0.50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos nian jarlibron kaj aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 480 37 (Wilh. Solzbacher. Köln) ; Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo: Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortagruppe Heiliges Feuer).

**POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN** en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvajn. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. Jara abonprezo : 1.20 RM. Propagandcele (sed oni tiam nur forsendas minimume 25 ekz.) ĝi kostas po ekzemplero **nur 3 feningojn!** Eldonejo : Verlag Erwachende Jugend, **Werl** (Kr. Soest), Germ.

« **LA JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » **estas** destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

**En angla kaj hispana lingvoj** similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.

# PREĜO POR LA PACO

**El la liturgio de Sankta Joannes Chrysostomus, ĉefepiskopo de Konstantinopolo, preĝata ĉiutage en la katolikaj kaj ortodoksaj preĝejoj de la greka rito.**

**Pastro** : Laŭdata estu la reĝeco de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito, nun kaj ĉiam kaj en centjarojn de centjaroj.

**Ĥoro** : Amen.

**Diakono** : Ni preĝu la Sinjoron en paco.

**Ĥoro** : Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni preĝu la Sinjoron por la paco de la tuta mondo, por la bonfarto de la Sankta Eklezio de Dio kaj por la unueco de ĉiuj.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni preĝu la Sinjoron por ĉi tiu sankta preĝejo kaj por ĉiuj, kiuj kun kredo, pieco kaj timo de Dio vizitas ĉi tiun lokon.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni preĝu la Sinjoron por nia eminenta ĉefepiskopo kaj metropolito N., por nia episkopo de Dio amata N., por la honorindaj pastroj kaj diakonoj en Kristo, por la tuta pastraro kaj por la tuta popolo.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni preĝu la Sinjoron por la bono de nia patrolando.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni preĝu la Sinjoron por ĉi tiu urbo (ĉi tiu vilaĝo, ĉi tiu monaĥejo), por ĉiuj urboj, vilaĝoj kaj landoj kaj por ĉiuj kredantoj, loĝantaj en ili.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni preĝu la Sinjoron por la bona vetero, por la kreskado de la terfruktoj kaj por pacaj tempoj.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni petu la Sinjoron, ke ni ĉiuj estu liberigataj de malĝojo, sufero kaj mizero.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Helpu nin, savu nin, kompatu nin kaj gardu nin, Sinjoro, per via favoro.

**Ĥ.** Sinjoro, kompatu nin.

**D.** Ni alvoku nian plej sanktan, plej puran, super ĉio benatan kaj gloroplenan Sinjorinon, la Dipatrinon kaj ĉiaman virgulinon Marion, kaj ĉiujn sanktulojn, kaj ni preĝodediĉu nin mem, unu la alian kaj nian tutan vivon al Kristo, nia Dio.

**Ĥ.** Al vi, ho Sinjoro.

**Pastro :** Ĉar al vi apartenas ĉia honoro, laŭdo kaj adoro, Patro, Filo kaj Sankta Spirito, nun kaj ĉiam kaj en centjarojn de centjaroj.

**Ĥ.** Amen.

# Manifesto

**kontraŭ deviga militservo kaj milita edukado de la junularo.**

**La registaroj de la mondo nun fine oficiale rekonis la rajton de la nacioj je la paco. En la Kellogg-Pakto ili malakceptis la militon kiel metodon de nacia politiko.**

**Tamen preparado por milito daŭradas. Evidenta estas la kontrasto inter la paco-vortoj de la registaroj kaj la daŭrigado kaj plivastigado de la militedukado.**

**Militedukado ekzistas en du formoj. En multaj landoj ĝi estas laŭleĝe deviga. En aliaj landoj, kvankam jure libervola, ĝi vere estas grandparte deviga per morala kaj ekonomia premo. Plue, ĉiuj registaroj pretendas rajti postuli militservon de ĉiu sia ŝtatano, ĉu viro aŭ virino.**

**Ni urĝe konfesas, ke jam venis la tempo, kiam ĉiu sincera pacamanto devus postuli forigon de la militedukado de la junularo kaj malkonfesi la rajton de registaroj, postuli devigan militservon. Deviga militservo submetas la individuon tute sub la militismon. Ĝi estas formo de sklaveco. La kutima akcepto de tiu sklaveco nur pruvas ĝian animdormigan influon.**

**Milita eduko estas instruo de spirito kaj korpo pri la tekniko de mortigo. Ĝi estas edukado por militado. Ĝi estas eternigo de la militspirito. Ĝi malhelpas kreskadon de la volo al la paco. La plenaĝuloj faras grandan krimon kontraŭ la junularo, edukante ĝin en lernejoj kaj universitatoj, oficialaj kaj privataj organizaĵoj, ofte sub preteksto de korpa ekzercado, pri la metio de la milito.**

**La packontraktoj devigis la venkitajn naciojn, ĉesigi la militedukadon de la junuloj kaj la devigan militservon. Jam venis la tempo, kiam la popoloj mem devus iniciati forigon de ambaŭ tra la tuta mondo.**

**Se la registaroj ne volas koni la profundan ribelon kontraŭ la milito, ili devas renkonti la reziston de tiuj, por kiuj lojaleco kaj sindono al la homaro kaj al la konscienco estas plej alta leĝo.**

**Popoloj de la mondo, decidu :**

**NE PLU MILITARISMO!**

**NE PLU DEVIGA MILITSERVO!**

**EDUKADO POR HUMANECO KAJ PACO!**

HUGO AATTELA, parlamentano (Finnlando),
JANE ADDAMS (Usono),
KARL AST, eksministro (Estonujo),
Dr. h. c. H. P. BERLAGE (Nederlando),
La anglikana EPISKOPO DE BIRMINGHAM,
VICTOR MARGUERITTE (Francujo),
H. W. NEVINSON (Britujo),
Prof. teol. GUSTAV MENSCHING (Latvujo),
Rektoro OLE OLDEN (Norvegujo),
LUIDIA PURENIENIE, parlamentanino (Litovujo),



PAUL BIRUKOFF (Rusujo),
VALENTIN BULGAKOFF (Rusujo),
Prof. Dr JOHN DEWEY (Usono),
Prof. Dr ALBERT EINSTEIN (Germanujo),
Prof. Dr. AUGUST FOREL (Svisujo),
Prof. Dr. SIGMUND FREUD (Aŭstrujo),
ARVID JAERNEFELT (Finnlando),
TOYOHIKO KAGAWA (Japanujo),
T. Z. KOO (Ĥinujo),
Prof. Dr. J. B. KOZAK (Ĉeĥoslovakujo),
Prof. teol. KARL KUNDZIN (Latvujo),
SELMA LAGERLOEF (Svedujo),
Dr. J. L. MAGNES (Palestino),
Dr. h. c. THOMAS MANN (Germanujo),
MAIT METSAENURK (Estonujo),
MIHKEL MARTNA, vicprez. de la parl., (Finnlando),
Prof. Dr. L. QUIDDE (Germanujo),
Prof. Dr. EMANUEL RADL (Ĉeĥoslovakujo),
Prof. Dr. LEONHARD RAGAZ (Svisujo),
Prof. Dr. H. B. RAHAMAEGI, eksministro (Estonujo),
AMEEN RIHANI (Arabujo),
HENRIETTE ROLAND-HOLST (Nederlando),
ROMAIN ROLLAND (Francujo),
Hon. BERTRAND RUSSELL, F. R. S. (Britujo),
Eksgeneralo Dr. h. c. Fr. von SCHOENAICH. (Germanujo),
RABINDRANATH TAGORE (Hindujo),
ELIN WAEGNER (Svedujo),
H. G. WELLS (Britujo),
STEFAN ZWEIG (Aŭstrujo),

Por ĉi tiu manifesto, el kies subskriboj ni nur kelkajn represis, estas respondeca la « **Joint Peace Council** » (« komuna paca konsilantaro »), en kiu kunlaboras jenaj internaciaj asocioj: INTERNACIA SERVA KOMITATO DE LA AMIKOJ, INTERNACIA ANTIMILITARISTA OFICEJO INTERNACIA KOOPERATIVA LIGO DE LA VIRINOJ, INTERNACIA FRATARO POR INTERPACIGO, INERNACIO DE ANTIMILITARISTAJ PASTROJ, PACA KOMITATO DE LA SOCIETO DE LA AMIKOJ, INTERNACIO DE MILITKONTRAŬULOJ kaj INTERNACIA VIRINA LIGO POR PACO KAJ LIBERECO.

# Papoj kontraŭ deviga militservo

**La principo.** — « Necesa estas honesta interkonsento de ĉiuj, por malpligrandigi la armadojn samtempe kaj reciproke laŭ starigotaj reguloj kaj garantioj en mezuro necesa kaj sufiĉa por la gardo de la publika ordo en ĉiu ŝtato. » BENEDIKTO XV-a, Letero, 1 aŭgusto 1917.

**La trompo de la armata paco.** — « Multnombraj trupoj kaj la senfina evoluigo de milita tekniko povas kelkfoje kontraŭstari malamikajn atakojn, sed ne povas havigi sendanĝeran kaj stabilan trankvilecon. La minacanta pligrandigo de la armeoj eĉ pli multe servas por inciti ol por subpremi rivalecon kaj suspekton. « LEONO XIII-a, Konsistoria parolado, 1889.

**La malbonaj sekvoj de la deviga militservo.** — « Fortaj junaj viroj estas elŝirataj el la agrikulturo, el nobligaj studoj aŭ el metio aŭ komerco aŭ arto, por esti metataj sub armilojn. Per tio la financoj de la ŝtatoj estas elĉerpataj pro la enormaj kostoj, la naciaj posedaĵoj estas malŝparataj, eĉ privataj propraĵoj malfortigataj; ĉi tiu armata paco, kiu nun regas, ne plu povas daŭri longan tempon. Ĉu tio povas esti la normala stato de la homa socio? » LEONO XIII-a, Praeclara gratulationis.

**La postulo de la forigo de deviga militservo.** — « Por la Apostola Seĝo la sola sistemo, kiu estas efika kaj kiu ankaŭ kun iomete da bona volo en ambaŭ flankoj estus realigebla, estus jena : **per komuna interkonsento inter civilizitaj nacioj forigi devigan militservon!** » Kardinalo Gasparri, letero nome de BENEDIKTO XV-a al la ĉefepiskopo de Sens, 7 oktobro 1917.

# MILITO KAJ PACO

## La voko de la Sankta Patro.

Denove en du belegaj paroladoj la papo alvokis la tutan mondon al la paco, en sia lastjara kristnaska parolado kaj en la vortoj, kiujn li elparolis okaze de la inaŭguro de la Vatikana Radio-Stacio la 12 februaro 1931. I. a. li diris en sia kristnaska alvoko :

« Koncerne la minacojn de novaj militoj, kiam la popoloj komprenas ankoraŭ tiel dolorsperte la malfeliĉegon de la terura lasta milito, Ni ne volas, Ni ne povas pensi, ke estas nuntempe civilizita ŝtato, kiu volas tiel fariĝi monstra hommortiganto kaj preskaŭ certe sin mortigi samtempe. Se pri ĝia ekzisto ni estus konceptontaj nur pozitivan dubon, tiam estus nia devo rigardi al Dio, dirante al Li la preĝon inspiritan de la reĝo-profeto, kiu bone spertis tamen militon kaj venkon (Ps. LXVII, 31) : « Dissipa gente quæ bella volunt : Dispelu la popolojn, kiuj deziras militojn », kaj ankaŭ la preĝon de la Eklezio : « Dona nobis pacem : Donu al ni pacon. » — — »

## Kaj la katolikoj?

Ĉie en la vasta mondo oni aŭdis tiujn energiajn vortojn, sed ekzistas multaj, multegaj katolikoj, kiuj nek kredas ilin nek faras ion, por realigi la ardan sopiron de la tuta homaro, kies kuraĝa heroldo estas la Sankta Patro. La papo ne volas kredi, ke ekzistas popolo, kiu volas la militon. Sed neniu ŝtato, neniu registaro, eĉ ne la katolikaj politikistoj kredas lin, ĉar ĉiuj preparas la militon, instruas junajn soldatojn pri mortigo, konstruas kanonojn, tankojn, aeroplanojn, militŝipojn, produktas venengasojn kaj aliajn terurajojn, malŝparas la monon de siaj malsatantaj ŝtatanoj, — ĉion kompreneble nur por « defendo », ĉar en la lastaj militoj ĉiam ĉiuj ŝtatoj nur defendis sin, neniu atakis... Sed kiel povas tion fari, subteni kaj toleri la katolikaj politikistoj, se ili vere kredus la papon, ke **neniu** nacio volas ataki? Neniu havas la kuraĝon, esti kristana ankaŭ en la politiko. Kaj la papo restas vokanto en la dezerto, eĉ inter la plimulto de la 300 milionoj da katolikoj.

## Se kristanoj silentas, parolu idolanoj!

Unu el la ĉefaj helpiloj, eĉ kaŭzoj de la milita spirito kaj de la militoj mem estas la **milita edukado de la junularo.** Ĝi havas plej diversajn formojn, ĝia plej terura estas tiu speco de sklaveco, kiu nomiĝas deviga militservo.



Malgraŭ ke la papoj ofte alvokis kontraŭ ĝi (mi nur rememorigas pri la Letero de Benedikto XV-a al la usonaj episkopoj fine de la milito kaj pri la Letero al la ĉefepiskopo de Sens el la jaro 1917), preskaŭ ĉie la katolikoj silentas anstataŭ protesti kaj forigi la nunan « nenormalan staton » (Papo Leono XIII-a). En la landoj, kiuj ne libervole, sed per devigo de la packontraktoj, forigis la militservodevon, oni klopodas praktiki militan preparon de la junularo alimaniere, kaj eĉ multaj katolikoj deziras restarigon de deviga militservo. — Do en la nuna momento devas esti tasko de ĉiuj sinceraj pacamikoj, ke ili komencu nepran kaj fortan agitadon kaj agadon kontraŭ la milita eduko de la junularo. Estas la granda merito de la Internacia Paca Konsilantaro (Joint Peace Council), ke ĝi preparis imponan manifeston, kiun ankaŭ La Juna Batalanto en ĉi tiu numero publikigas. Hontiga estas la malgranda nombro de la katolikoj kaj de la kristanoj entute, kiuj kunlaboris. Denove realiĝas la ekzemplo de la Sankta Skribo : La homaro estas falinta inter la rabistojn de la milito ; pastro kaj levito preteriras, sed fine la samariano, do la idolano, venas por helpi. Jes, se kristanoj silentas, parolu la idolanoj! Se ni komparas homon kiel Gandhi kun la eŭropaj politikistoj, kiuj nomas sin kristanoj, tiam oni povas fariĝi tre malĝoja. Vere, ne tiu, kiu diras Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la Ĉielo, sed tiu, kiu **faras** la volon de Dio...

Kaj tamen! Almenaŭ ni gejunuloj katolikaj volas havi kredon je la paco, ne tiun kredon kun la mil rezervoj kaj esceptoj, sed nepran kredon, tiun kredon, kiu eĉ movas montojn! Kaj tiu kredo ne estu nura kredo de la sentado kaj de la vortoj, sed kredo, kiu pruvas sian fortecon per agado. Kaj ni preĝas kun la Sankta Patro : Sinjoro, dispelu tiujn, kiuj volas militojn! Donu al ni la pacon! W. S.

# ĈI TIU NUMERO

**bedaŭrinde aperas kun malfruiĝo. La ĉefa kaŭzo estas, ke nia mono estis elĉerpita. Tro malgranda ankoraŭ estas nia abonantaro, por pagi la altajn kostojn, kaj krom la abonmonoj ni preskaŭ nenion enspezas. Krome tro multaj geamikoj skribis, ke ili nur povos pagi « poste ». Ĉu ili scias, en kian situacion nin kondukas tia prokrasto? Se ili vere ne povas pagi ĝustatempe, ni volonte penas atendi. Sed certe kelkaj el ili kun iom da bona volo povus eviti al ni multajn malagrablaĵojn.**

**La nombro de niaj abonantoj en la lasta jaro pli ol triobliĝis kaj eble estas pli granda ol tiu de aliaj Esperanto-gazetoj similcelaj. Sed ni ne havas riĉajn geamikojn, por pagi deficitojn. Nia sola forto estas vi, niaj geabonantoj. Ni bezonas ankoraŭ 350 novajn abonantojn, por povi ekzisti senzorge! Helpu kaj varbu! Kaj ne estu tro forgesemaj!**

**Ni ricevis kelkajn plendojn. Plej simpatia estis al ni la plendmetodo de tiu pastro, kiu aldonis al sia plendletero 5.— markojn. Se 30 geabonantoj estus havintaj la saman efikan ideon, ni estus povintaj sen malfacilaĵoj plenumi iliajn petojn! La Juna Batalanto dependas de la disciplino kaj oferemo de siaj tutmondaj geabonantoj. Pruvu, ke tiu bazo estas forta kaj fidinda. Ni klopodos, ke malfruiĝoj ne plu okazu. Sed tio ne dependas sole de ni. Antaŭen! Dio kun ni!**

**LA ELDONEJO.**

# Blankaj kaj Flavaj Homoj.

**« La Blua Ekspreso »,**

De **Marcel Laloire**, Bruxelles.

Ni ne intencas kritiki aŭ defendi laŭ teknika vidpunkto tiun filmon. « La blua ekspreso » apartenas al la bolŝevistaj filmoj kun vere arta karaktero produktitaj de la Sovkino en Moskva. Jen la resumo laŭ la programo : « La tuta agado de la filmo okazas en la diversaj vagonoj de ĥina ekspresvagonaro, kiu transportas en siaj tri klasoj individuojn kun plej malsamaj psikologioj.

La civila milito en Ĥinujo disŝiris familion. Unu filo fariĝis lokomotiv-hejtisto, la alia kulio (plej malsupra laboristo), kaj ilia fratino estas « ludonita » por tri jaroj al fabrikejo. La hazardo kunigis la tri gejunulojn en la sama vagonaro.

La brutaleco, kun kiu certaj vojaĝantoj traktas la ĥinojn kaj la provo de blanka aventurulo, rabi la malgrandan ĥinan knabinon, maltrankviligas la trian klason. Estiĝas ribelo, kaj la vagonaro venas sub la potencon de la revoluciuloj kaj transpasas la landlimon... »

La revolucia tendenco de la filmo ne bezonas diskuton. La soveta kino ne volas esti senpartia, obejektiva, dokumentiga, ĝi devas servi difinitan ideon : la revolucion. La kino estas edukilo, propagandilo, batalilo. Do estas normale, ke la soveta filmo ne estas dediĉata al la laŭdo de la burĝo, de la kapitalisto, de la kapitalista armeo; estas normale, ke, priskribante okazajojn, kiuj koncernas potencajn eŭropanojn kaj flavajn proletariojn, ĝi prezentas eŭropanojn, kiuj estas teruraj personoj, kaj proletariojn, kiuj estas la viktimoj de tiuj eŭropanoj kaj per tiu fakto fariĝas simpatiaj.

Post ĉi tiuj preparaj rimarkoj mi devas konstati, ke la filmo ekzakte pristkribas unu el tiuj profunde indignigaj okazajoj, je kiuj tro multe da eŭropanoj kulpiĝis en Ĥinujo kaj alie : la kruelaĵoj kontraŭ la indiĝenoj, la brutalaĵoj, kaj la terura ekspluatado de infanoj en la fabrikejoj de la eŭropaj kapitalistoj. Tiuj faktoj estas nediskuteblaj, ili estas historiaj, ili ne estas izolitaj, ili ripetiĝis en multegaj ekzemploj.

La eŭropaj registaroj portas la respondecon por tio, ĉar ili ne nur defendis tiujn agmanierojn, sed ili mem donis la ekzemplon. Mi opinias, ke ne plu estas necese longe paroli pri la tielnomata opiomilito (1840), per kiu Anglujo milite devigis Ĥinujon al uzado kaj konsumado de venenoj rason detruantaj.

Hodiaŭ ankoraŭ la dokumentoj de la Ligo de Nacioj publikigas terurajn statistikojn, montrante la gajnojn, kiujn eŭropaj nacioj faris je la kostoj de indiĝenaj rasoj : 950 kilogramoj da morfio, 3 000 kil. da heroeno, 90 kil. da kokaeno, jen la sumo de la ĝuvenenoj eksportitaj de Nederlando en 1927 kaj en la unua triono de 1928, la plej granda parto al la Ekstrema Oriento. « Kokaeno estas importata en Hindujon, Malajujon kaj aliajn regionojn en konsiderindaj kvantoj » (raporto al la konsilantaro de la Ligo de Nacioj, 1930, pĝ. 385). La viktimoj estas ĝenerale la juna generacio. Egiptujo vere dronas en ĝuvenenoj venintaj el Eŭropo, por tie produkti ruinojn kaj mizeron. La batalado kontraŭ la toksikomanio (emo al ĝuvenenoj) puŝiĝas al la malbona volo de la registaroj pro **ekonomiaj kaj financaj interesoj**. Kio estas skurĝo por unuj, estas profito por la aliaj. Ni nenion plu bezonas aldoni.



Vere, kiam ni aŭdas pri tiaj abomenaĵoj faritaj de blankuloj kaj por kiuj ĉiu el ni portas parton de respondeco, ni povus diri kiel tiu vizitinto de la filmo « Blankaj Ombroj » : « — Oni eliras de tie, kvazaŭ hontante pri la koloro de sia haŭto. »

Kaj tiam la kutimaj paroloj pri la « supereco de la blanka raso » fariĝas iom groteskaj...

Estas sendube facile post tio, paroli pri bolŝevismo, flava danĝero, orienta barbareco, kaj alvoki la eŭropajn naciojn, ke ili formu la « unuecan fronton » kontraŭ la minacoj venantaj el la oriento.

Estus multe pli utile por la honoro de nia eŭropa civilizo kaj por nia blankula « indeco », laŭte kaj publike malaprobi tiujn hontigajn kaj abomenajn agojn, zorgi, ke ili estu finataj, malhonori iliajn aŭtorojn kaj profitantojn, kaj poste deziri, ke la indiĝenaj popoloj ĝuu en trankvilo la samajn liberecojn, kiujn ni posedas. Tiaj deklaroj havus grandegan efikon kaj certe faciligus la solvon de la timiga problemo de la rilatoj inter okcidento kaj oriento. Ni scias, ke la malplej granda gesto, la malplej laŭta vorto de eŭropano en tiu senco estas senprokraste publikigata, citata kaj komentariata por aŭ kontraŭ ni en la oriento. Tial ni kredas, ke ni povas diri en plena sincereco, ke **la katolika junularo, obeanta al la direktivoj de Lia Papa Moŝto, malaprobas la agojn, la sintenon, la politikon de siaj maljunuloj, deziras kuraĝe kaj tutkore, ke la orientaj nacioj povu en proksima estonteco ne nur havi politikan liberecon, kiu estas sufiĉe relativa bono, sed ĝui kulturon libere evoluantan kaj libere aliĝi en plena sendependeco, en plena egaleco kun la aliaj nacioj de la mondo, al la granda unueco de la Mistika Korpo de Kristo.**

Nia junularo klopodas ĉiutage pli reale kaj logike fariĝi **katolika.** Tial raportoj kaj filmoj, kiel tiu, kiun ni priskribis, apelas al ĉi tiu junularo kiel atestantoj de epoko, kiun ĝi kondamnas, kiel batatiloj, kiujn ĝi faras siaj, eĉ kontraŭ blankuloj, kiujn ĝi malestimas...

trad. el « Jeunesses Politiques », dec. 1930.

## ŜTATOJ KAJ RABISTAJ BANDOJ

Ŝtato sen justeco, kio alia do ĝi estas ol granda rabista bando? Ĉu tiaj bandoj ne ankaŭ estas malgrandaj ŝtatoj? Tie aro da homoj sekvas sian estron, estas kontrakte kunigita al societo kaj dividas sian rabitaĵon laŭ interkonsento. Kaj se tia aro da malbonuloj tiel grandiĝas, ke ĝi okupas landon, fondas konstantajn loĝejojn, almilitas urbojn, subigas popolojn, tiam ĝi ja povas akcepti la nomon de « ŝtato », kiun ankaŭ la publiko aljuĝas al ĝi, ne kvazaŭ la rabemo estus ĉesinta, sed ĉar ĝi nun povas realiĝi senpune. Bonaj kaj trafaj estas tiuj vortoj, per kiuj kaptita pirato respondis al Aleksandro la Granda. Kiam la reĝo riproĉis tiun viron, pro kio do li endanĝerigas la maron, li diris : « Kial do vi endanĝerigas la tutan mondon? Sed ja min oni nomas rabisto, ĉar mi tion faras sur malgranda ŝipeto, sed vin kun la granda ŝiparo oni nomas imperiestro. »

SANKTA AUGUSTINUS (Civ. Dei V 19).

# Internacia Junulara Agado

**La Kristanaj Asocioj por Junaj Viroj** (YMCA), kiuj en vere modela maniero organizis internacian kunlaboradon kaj al kiuj ĝis nun ni katolikoj tute ne povas kompari niajn instituciojn, bone progesis en la lasta jaro. Ili preparas sian grandan mondkongreson, kiu okazos en aŭgusto 1931 duone en **Toronto** (Kanado), duone en **Cleveland** (Usono). La eksterlandaj partoprenantoj estos gastoj de la amerikaj asocioj kaj pagos nenion por veturado kaj loĝado post transpaŝo de la usona landlimo. En Londono kunvenis la Internacia Komitato sub prezido de D-ro Mott. Inter la ĉefaj parolantoj de la mondkongreso estos la japana kristana gvidanto **Kagawa,** la amerikana verkisto Rufus **Jones** ktp. Ŝajnas, ke en la centro de la mondkongreso staros tiu demando de Kristo al Petro, pri kies respondo neniam silentiĝis la diskutado en la protestantaj eklezioj kaj movadoj, tiu demando de Kristo: « Kion vi kredas pri la Filo de la Homo ? ». Ni deziras al niaj protestantaj fratoj, ke ili neniam perdu la sanktan maltrankvilon pri tiu demando, antaŭ ol ili estos trovintaj la veron.

**Internaciaj kristanaj junularaj konferencoj** organizitaj per la YMCA-movado okazis multaj en la lastaj jaroj. En **Berlin** okazis ilia **I-a Eŭropa Kongreso por Gimnastiko kaj Sporto,** meze de aŭgusto. En **Fanoe** (Danujo) kunvenis kristanaj **skoltoj** el Anglujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Svedujo kaj baltikaj landoj al internacia tendaro, en **Bruar** (Skotujo) tendaris studantoj de Eceoj, en **Szasava** (Ĉeĥoslovakujo) okazis internacia tendaro, kiun partoprenis junuloj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj kaj el Ameriko. Interesan diskutadon pri internaciaj rilatoj de la ŝtatoj gvidis Prof. Radl el Praha. En **Hœflitz ĉe Niemes** (Ĉeĥoslovakujo) kunvenis 70 ĉeĥaj kaj germanaj junuloj el ĉiuj religiaj konfesoj (eĉ judoj) kaj interamikiĝis. En **Tartu** okazis konferenco por la **baltikaj ŝtatoj.** En **Dassel** (Germanujo) okazis 16-22 oktobro internacia konferenco pri la kristana laborado inter kamparana junularo. Ĉeestis 22 delegitoj el 14 landoj kaj 3 kontinentoj, ankaŭ unu sekretariino de la Kristanaj Asocioj por Junulinoj. Oni tre bone kaj praktike laboris.

**Gravan perdon** havis la YMCA-movado per la morto de la prezidanto de sia hinda nacia konsilantaro, Raja Sir Harnam Singh. Li estis kronprinco de sia lando, sed devis rezigni sian tronon pro sia konvertiĝo al la kristanismo.

**La Kristanaj Asocioj por Junulinoj** (YWCA) transigis sian centrejon de London al Genève. En **St. Cergue** (Svisujo) okazis 17-24 junio kunveno de la internacia komitato, pli ol 200 delegitinoj el 37 landoj ĉeestis. Nova prezidantino fariĝis F-ino van Asch van Wyck (Nederlando).

**La Mondfederacio de Kristanaj Studentoj** ankaŭ progresis. Speciale pri unu gravega okazaĵo ni raportu: En **Fort Hare** (Sudafriko) okazis la unua **Bantu-Eŭropana Studenta Konferenco,** 27 junio-3 julio 1930, kiun ĉeestis 150 nigraj (bantu-negroj) kaj 60 blankaj studentoj kaj 50 eksuniversitatanoj, nigraj kaj blankaj. La konferencon preparis kaj gvidis **Max Yergan,** negro naskiĝinta en Usono, kiu nun estas la ĉefo de la kristana (protestanta) junulara kaj studenta movado inter la sudafrikanaj negroj. Jen kelkaj temoj el la programo: « La Dia ordo por la socia vivo de la bantuoj », « Justa ekonomia sistemo », « la rasproblemo en la lumo de la doktrino de Jesuo ». Oni diskutis la problemon de la urba laboro. La negroj venantaj de la kamparo en la urbon multe pli rapide akceptas la malbonajn kutimojn de la eŭropanoj ol la bonajn influojn por ilia karakterformado, kiel eduko al ŝparado kaj higieno, kutimiĝo al regula laborado, intelekta klereco. Granda danĝero estas la liberaj horoj, la krimeco ankoraŭ pligrandiĝas pro la nekono de la leĝoj. Skandalaj estas la terposedrilatoj en Sudafriko. El 14 partoj de la tero 13 estas en la manoj de la 1709000 eŭropanoj, dum ke la resto (unu dekkvarono !) restas por 5 ¼ milionoj da indiĝenoj! El tio rezultas la devo, elmigri de la kamparo en la urbojn. La konferenco de Fort Hare, kiu okazis en la spirito de vere kristana frateco, faris praktikajn proponojn por la plibonigo de la rilatoj en urbo kaj kamparo, ekz. pri: jura protekto kaj juĝeja helpo; esplorado de la krimeco kaj de ĝiaj kaŭzoj per la eklezioj; novreguligo de la alkoholproblemo (kiel plej bona solvo oni rekomendis plenan malpermeson de la alkoholo); plifaciligo de terluo al indiĝenoj; kreo de jura protekto por servistinoj, donado de propraj litoj al servistinoj, ekcelado de la sociala Settlement-movado de universitatanoj, kunhelpo de blankuloj en dimanĉolernejoj por nigruloj, ŝanĝo de la ĉikanaj pasportleĝoj ktp. — Je la fino okazis komuna diservo de ĉiuj blankuloj kaj nigruloj, pastroj de 12 protestantaj eklezioj partoprenis en ĝi. — Kompreneble la konferenco de Fort Hare kaŭzis akrajn atakojn kaj polemikojn flanke de certaj blankulaj rondoj en Sudafriko, speciale de buroj nederlandlingvaj. Jam aperis 243-paĝa presita raporto.



**En la movado por Kredo kaj Konstitucio,** kies lasta granda konferenco okazis en Lausanne, oni jam 1929 atentigis pri la graveco, gajni la junularon por la ekumena movado. En la konferenco de la daŭriga komitato partoprenis 1930 unuafoje grupo de dek junuloj. Kanoniko Tatlow kaj D-ro Visser 't Hooft estas petitaj zorgi pri starigo de oficialaj rilatoj inter la daŭriga komitato kaj la junulmovadoj. La sekvonta Mondkongreso estos kredeble 1937.

**La Ekumena Konsilantaro por Praktika Kristanismo** estas la nova nomo de la provizora daŭriga komitato de la Intereklezia Konferenco por praktika kristanismo (Life and Work) en Stockholm 1925. La Konsilantaro kunvenis 1-5 septembro en **Chexbres** (Svisujo). La Konsilantaro konsistas el 95 membroj elektitaj de la 5 grandaj sekcioj (amerika, brita, eŭrop-kontinenta, ortodoks-orienta, aliaj landoj), krome el kelkaj gvidantoj de internaciaj movadoj. El la junularo apartenos al ĝi delegitoj de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj, de la Kristanaj Asocioj de Junulinoj kaj de la Mondfederacio de Kristanaj Studentoj. Ekzistas speciala Junulara Komisiono, kiu okazigos komence de majo 1931 « **Socialan Studsemajnon** » en **Genève.**

**Internacia Konferenco de la Ortodoksa Junularo en Saloniki** okazis 3-8 novembro 1930, organizita de la Junulara Komitato de la Ekumena Konsilantaro por Praktika Kristanismo. Ĉeestis kelkaj protestantaj gastoj, gvidantoj de internaciaj organizaĵoj ktp., ĉefepiskopo Sœderblom de Upsala estis sendinta svedan pastron. La unua tago donis ĝeneralan superrigardon pri la hodiaŭa situacio de la junularo en Bulgarujo, Grekujo kaj inter la rusaj emigrantoj en Centra kaj Okcidenta Eŭropo. Oni parolis pri edukaj problemoj, pri la materialistaj tendencoj en la laika lernejo, la solvo de la juna generacio de la religia tradicio kaj de la eklezio, sed ankaŭ pri la spirita renoviĝa movado, speciale inter la junularo de la rusaj emigrantoj. Jen kelkaj temoj el la programo: « La eklezio kiel fonto de la kulturo », « la sociala agado de la eklezio », « sociala edukado per eklezio kaj familio ». Unu el la partoprenintoj skribas en siaj impresoj: « Mi miris pri la sincereco, kun kiu post venko de komenca timemo la diskutado progresis. Oni akcentis la signifon de la modernaj edukaj metodoj kaj la edukan respondecon de la eklezio al la kreskanta generacio. Kaj fine oni ne timis la konfeson de la preterlasoj de la eklezio en la kampo de la sociala, morala kaj intelekta vivo ». La estro de la rusa delegitaro, **Prof. Zenkovskij,** paroladis pri la profunda interna ŝanĝo en la ortodoksa eklezio. —

**La Mondkonferenco de la Junularaj Ligoj por Kristana Penado,** kies centrejo troviĝas en Boston (Usono), okazis 4-16 aŭgusto 1930 en **Berlin**-Charlottenburg kun delegitoj el ĉiuj landoj kaj kontinentoj. La vortoj de unu parolanto: « La plej grava tasko de la kristana junularo estas, batali pri la junularo en la ekstremorientaj landoj, kiu tie sidas kvazaŭ sur vulkano », kaŭzis akran atakon flanke de la komunista junularo.

### 3. ALIRELIGIA JUNULARO.

**Mondligo de la Budhista Junularo** estas fondita en la Unua Mondkongreso de la Budhista Junularo, kiu okazis fine de julio 1930 en Honolulu (Hawaji-Insuloj, Oceanio). Oni volas krei grandan internacian organizaĵon laŭ la ekzemplo de la kristanaj mondligoj kaj entrepreni ankaŭ grandskalan « misian » agadon.

### 4. STUDENTA JUNULARO.

**La Internacia Studenta Konfederacio** (CIE) havis en aŭgusto siajn **internaciajn sportkonkursojn** en **Darmstadt,** kiuj bone sukcesis. Bedaŭrinde malpli agrable pasis la jara **kongreso** de la CIE, kiu tuj poste okazis en **Bruxelles.** Ĝi alportis ion, kion oni preskaŭ povus nomi katastrofo. Germanoj, hungaroj, italoj foriris. Mankas ankoraŭ tre multe, por starigi vere konfidoplenan kaj fortan internacian solidarecon de la studentoj !

**Franca-Germana Studenta Kunveno** estis organizita por meze de septembro en **Mannheim** (Germanujo). La reprezentitaj organizaĵoj estis nur malgranda parto de la studentaro el la du landoj: katolikoj, socialistoj, demokratoj. Tamen en Mannheim oni vere fruktodone kunlaboris. En ĉiuj landoj nun tiuj, kiuj energie batalas por internacia paco kaj frateco, estas malplimultoj. Sed de la agado de tiuj malplimultoj dependas la sorto de la estonteco...

Pri **PAX ROMANA** vidu raporton sub « katolika junularo », pri la **Mondfederacio de Kristanaj Studentoj** sub « protestanta junularo »!

W. S.

(daŭrigota)

# NIA MOVADO

### Aŭstrujo.

**Wien.** Esperanto-kursoj de niaj amikoj Mudrak kaj Jakob.

### Belgujo.

**En Bruxelles** okazos fine de aŭgusto kune kun la kongreso de la A. C. J. B. (Belga Katolika Junulara Asocio) internacia studsemajno de la katolika junularo kun ekspozicio. MOKA estas invitita partopreni. La kunveno promesas fariĝi tre interesa kaj sukcesa.

### Francujo.

**Paris.** Nia germana MOKA-sekretario Heinz Kolvenbach estis kelkajn semajnojn en Paris kaj povis viziti geamikojn kaj gravajn asociojn. Pastro Lalande, ĉefgvidanto de la Franca Katolika Junulara Asocio, akceptis lin, donis valorajn informojn kaj promesis helpon. Kune kun nia franca MOKA-sekretario Prof. Muffang H. Kolvenbach vizitis diversajn instituciojn. I. a. li faris paroladon en la famkonata « Club du Faubourg ».

**Elzaso.** Nia germana sekr. Kolvenbach faris rondvojaĝon kaj trovis intereson por nia movado.

### Germanujo.

**La vojaĝa servo** de MOKA preparas ampleksan laboron, kiun ĝi faros en kunlaboro kun katolikaj vojaĝagentejoj kaj junularaj ligoj diverslandaj. Petu prospekton de la sekr. Kolvenbach, Düsseldorf, Stoffeln 23 !

**Por la germana-pola interpaciĝo** okazos en aprilo paroladvojaĝo de ĉefsekretario Kaspar Mayr el Wien kaj de Universitata Docento D-ro Dembinski el Krakow. Por la preparo ĉefe kunhelpas niaj amikoj D-ro N. Ehlen, Peter Klein kaj W. Solzbacher. Pri detaloj skribu tuj al K. Mayr, Wien VII., Dœblergasse 2/26. En la paska semajno kredeble okazos speciala konferenco.

**La manifeston kontraŭ milita eduko de la junularo** propagandis en Germanujo speciala komitato, en kiu kunlaboris kiel oficiala delegitino de MOKA Gertrud Odenthal (Berlin). Estas publikigita speciala aldona alvoko kun subskriboj de multaj gvidantaj personoj el la kultura, scienca, literatura, sociala kaj politika vivo. El la subskribintaj organizajoj bedaŭrinde nur tri estas katolikaj, inter ili kompreneble la germana sekcio de MOKA.

**En Altenberg** okazis 23-25 januaro la jara kunveno de la Katolika Junularo de Germanujo. Partoprenis tri delegitoj de MOKA. Kelkfoje oni laŭde atentigis pri la agado de MOKA, kiu estas plenrajta membro de la Katolika Junularo de Germanujo, ankaŭ la prezidanto, Prelato Wolker, akcentis, kiel necesa estas elita agado por paco kaj internacia kunlaborado, kia ĝi estas farata en MOKA.

**Radio-Paroladoj de la internacia sekretario.** El la okcidentgermanaj radio-stacioj (Kœln, Langenberg, Aachen, Münster) W. Solzbacher paroladis en novembro 1930 pri « La juna generacio en Nederlando kaj Belgujo », en februaro 1931 pri « La juna Afriko ».

**Internaciaj migradoj.** En lasta aŭtuno nia amiko August Günther gvidis du anglajn junularajn grupojn tra Germanujo (unu dum 2 semajnoj, alian dum 3 semajnoj). Entute partoprenis 23 angloj, 2 svedoj kaj 4 germanoj. En 1931 li ripetos la migradojn. I. a. li ankaŭ gvidos grupon al Italujo.

**Berlin.** La eksterordinare sukcesaj Esperanto-kursoj de Pastro Andreo Ĉe esperigas ankaŭ por nia movado novajn progresojn. — En la Katolika Popola Unuiĝo (Volksverein) diversaj paroladoj de August Günther pri la paca problemo. Oni kolopodos akaŭ ripeti la infantendaron.

...... ......

**Düsseldorf.** Pestalozzi-Lernejo de MOKA eldonis sian kutiman detalan raporton kaj programon, kiun interesuloj povas peti de la estro Heinz Kolvenbach. Por la kursoj oni uzas Linguaphone-metodon.



**Essen.** Kredeble en aprilo okazos parolado de W. Solzbacher pri la problemoj de sudorienta Eŭropo.

**Kœln.** Kunlaboro de niaj geamikoj en diversaj katolikaj kaj neŭtralaj kunvenoj por germana-franca interpaciĝo; en la komitato ni estas reprezentataj. MOKA aliĝis al la loka kartelo de la Katolika Junularo kiel plenrajta membro. — En januaro W. Solzbacher paroladis en la Akademiana Profesia Unuiĝo por Ekonomia kaj Sociala Administro pri « La Juna Afriko ».

**Miltenberg.** Ni ankoraŭ ricevas raporton pri la demonstracio de MOKA, kiu okazis dum la vizito de August Günther kaj de la angla junulara grupo. Günther paroladis pri « La papoj kaj la paca movado ». Antaŭ kaj post la kunveno estis demonstracia marŝo tra la vilaĝo kun akompano de la du muzik-orkestroj de la katolikaj junmetiistaj unuiĝoj de Miltenberg kaj Kleinheubach. La agrabla kunestado de angloj kaj germanoj bone efikis.

**Stuttgart.** Heinz Kolvenbach travojaĝante vizitis la Germanan Eksterlandan Instituton kaj intertraktis pri kunlaboro.

**Vestfalujo** (Westfalen). En diversaj lokoj en februaro okazas paroladoj de August Günther en kunvenoj de la Germana Paca Societo.

### Ĥinujo.

**Nia ekssekretario** P. Joh. Bapt. Kao O. F. M. (nun en Romo) sendis detalan raporton pri sia vojaĝo, kiun li bone eluzis por nia movado. Li vizitis, vojaĝante de la provinco Shensi tra Peiping (Peking) al Shanghaj, MOKA-anojn, katolikajn junularajn grupojn ktp., ankaŭ diversajn episkopojn. En Peiping lin akceptis la Apostola Delegato ĉefepiskopo Celso Costantini kaj aŭdis kun granda intereso la raporton pri MOKA kaj ĝia agado en Ĥinujo, promesante sian plenan simpation. — Kiel P. Kao skribas, MOKA nun havas membrojn en 11 provincoj. La plej bonaj grupoj estas en **Tung-Yuen-Fang** (pli ol 30 membroj sub gvido de Alozio Ly), en **Tsi-Nan-Fu** (ĉ. 20 junuloj sub gvido de Andreo Chang) kaj en **Tay-Yuen-Fu** (17 membroj). — Intertempe la internacia sekretario jam ricevis leterojn de niaj amikoj Andreo Chang O. F. M. (Tsi-Nan-Fu), Paŭlo Tch'ang (Tsi-Nan-Fu) kaj Joseph Chen (Cha-La ĉe Peking), kiuj ĉiuj raportas pri granda intereso kaj bonega progresado de niaj ideoj kaj nia movado, speciale ankaŭ de Esperanto. Bedaŭrinde Andreo Chang pro grava alia tasko, kiun donis al li lia episkopo, estas iom malhelpata, sed lia amiko Paŭlo Tch'ang promesas fari multe da laboro anstataŭ li, speciale daŭrigante la propagandon per la gazetaro. Ni gratulas niajn ĥinajn amikojn kaj deziras al ili plian sukceson !

### Jugoslavujo.

**Zagreb.** Novan fervoran kunlaboranton ni trovis en unu el la gvidantoj de la «Krizari»-junulara movado. Li publikigis diversajn notojn pri Esperanto en la gazetoj « Kriz » (« Kruco ») kaj « Njedelja » (« Sen ajno »). Li ankaŭ volas varbi por La Juna Batalanto. En Zagreb li gvidas Esperanto kursoa por la katolika junularo kun granda partoprenantaro. Ni deziras al nia amiko **Vlado Kunić** plenan sukceson. Espereble baldaŭ efika nacia komitato de MOKA povos formiĝi en Jugoslavujo malgraŭ malfavoraj eksteraj cirkonstancoj.

### Peruo.

**Nacia sekretario.** Agento de MOKA kaj La Juna Batalanto estas Ildefonso Nunez, nun en **Cajamarca.**

### Polujo.

**Lwow.** Ukrajna ĵurnalo « Dilo » raportis pri la artikolo de Issaiv-Czerkavskyj en La Juna Batalanto kaj pri la vizito de W. Solzbacher ĉe la ukrajnaj katolikoj de Lwow.

### Rumanujo.

**Cluj.** Esperanto-kursoj de nia nacia sekr. Simon Csora en skoltaj trupoj.

**Ĵurnaloj** ruman-, hungar- kaj germanlingvaj en Blaj, Cernauti, Cluj kaj Gherla raportis pri vizitoj de la internacia MOKA-sekretario.

### Saar-Regiono.

Vizito de la germana MOKA-sekretario Heinz Kolvenbach vekis intereson.

### Svisujo.

**En la internacia junulara kunveno** ĉe St. Gallen nia germana sekr. Kolvenbach ĉeestis kaj vekis intereson.

# Sur Nia Librotablo

## RECENZEJO DE NOVAJ LIBROJ DE INTERNACIA INTERESO.

### Cosmopolis kaj Teilopa.

Aperis du grandiozaj libroj pri la katastrofo de tio, kio hodiaŭ fiere nomiĝas «civilizo», kaj ili estas kiel la pentoprediko de Noa antaŭ la diluvo. La mortbatalo de Eŭropo venos, kaj el la kaoso eliros nova kulturo kaj nova mondo, kiu, forgesinte la frenezecon de satana civilizo, sin klinos antaŭ la kruco de Kristo. Tiujn librojn mi devas rekomendi al ĉiuj, kiuj komprenas iliajn lingvojn. La unua estas franca kaj verkita de la jesuita patro Albert Bessières, daŭrigante ties verkon. « Le désert fleurira » (« la dezerto ekfloros »), pri kiu La Juna Batalanto atentigis antaŭ du jaroj; la duan verkis juna germana poeto Cosmus Flam.

**Albert Bessières, l'Agonie de Cosmopolis,** romano, Editions Spes, Paris 1929, 268 pĝ., broŝ. 10 fr. fr.

**Cosmus Flam, Athanasius kommt in die Grossstadt** oder Die Tiergrube. Bergstadtverlag, Breslau 1930, 376 pĝ., tolbind. 6 Reichsmark.

La du libroj estas utopioj. En « Agonio de Kosmopolis » la fantazio de la aŭtoro kondukas nin en la jaron 1950, en la libro « Atanazio venas en la grandan urbon » ni travivas ian venontan epokon plenan je novaj « progresoj »... Ni legas pri fantazie grandaj domegoj kaj urbegoj, pri aeroplanoj kaj « aerobusoj », pri plej racie evoluinta tekniko kaj scienco, pri dinamito kaj venengaso, pri bolŝevismo, nihilismo, kapitalismo, pri sangaj revolucioj kaj diktatorajoj, pri homoj el ĉiuj nacioj kaj rasoj. La urbego, en kiu okazas la romanoj, nomiĝas en la franca libro « Cosmopolis», en la germana « Teilopa » (« Templum illustre Europae », « brila templo de Eŭropo »). Flam skribas en antaŭrimarko: « Ĉi tiu libro estas utopio. Ĝi nur volas montri, ke la spirito de Teilopa kaj la Sankta Spirito ne estas samaj. Kaj tio vere ne estas utopio ». Jes, tion ni devas scii kaj ĉiam denove laŭtvoĉe voki en la orelojn de niaj kunhomoj, ke la spirito de nia epoko, la spirito de egoismo kaj profito, de mamono kaj milito, de kapitalismo, bolŝevismo, ŝovinismo ne estas Spirito de Dio, sed spirito de la diablo. Por ĝin pli klare ekkoni, legu la librojn de Bessières kaj Flam! Rakonti la tutan enhavon mi ĉi tie ne povas. Sed lasu min citi kelkajn partojn.

Du fratoj, unu inĝeniero kaj unu pastro, renkontiĝas. La inĝeniero klarigas vastegan kemian fabrikejon, kiu produktas grandamase sterkojn, kolorojn kaj — venenojn. La pastro demandas: « Kaj por kio servas tiuj teruroj ?» Lia frato respondas :» Esence, por gajni oron; apude por ornami kaj parfumi la sinjorinojn; por nutri la grenkampojn, kiuj nutras la homojn, por fabriki la eksplodilojn, kiuj ilin mortigas... » Kaj poste li rakontas: « En la lastaj tagoj mi ricevis permeson, por viziti la templon de la idolo, kiu regas tutan tiun aktivecon, kiu la animojn ankoraŭ pli malpurigas ol la pejzaĝon: la sanktejon de la oro, kiu troviĝas en la subterajoj de la Banko de Francujo... Dudek tunoj da orstangoj en sigelitaj kverkaj bareloj, garditaj kiel neniam estis imperiestro, papo aŭ kalifo, jus estis alvenintaj. La numeritaj relikvujoj vidis fermiĝi ĉirkaŭ si ok ferajn pordojn kun triobla seruro, kiuj mem estis gardataj per la lastaj eltrovajoj de la scienco. Malmute mankis, ke tiuj oficistoj, tiuj soldatoj, kiuj formis la eskorton de la dio, kaj la malmultaj vizitantoj, kiuj rajtis rigardi lin, estus surgenuiĝintaj... La sankta emocio estas malpli granda en tiu malgranda kripto de Sankta-Petro en Romo, kie sub la altaro de la Konfeso kaj sub la kupolo de Michelangelo ripozas la restajoj de Sanktaj Petro kaj Paŭlo. Tie mi meditis kelkajn momentojn...... **Tiom longe ke la dio Mamono regos, ni ĉiam pli multe eniĝos en la malhelajon. La perforto estos reĝino de la mondo; kiel ajn oni sonleĝigas la militon, la milito senleĝigos la leĝokodojn......»**

La du libroj estas en kelkaj rilatoj similaj, sed ili tamen estas malsamaj. Preskaŭ oni povus diri, ke ili estas tiel malsamaj kiel la franca kaj la germana karaktero estas malsamaj. Ili estas **kristanaj** libroj, sed tute ne en tiu senco, kiel oni tion diras pri certaj piaĉaj kaj dolĉaĉaj edifajoj, ili ne estas agrable kaj facile legeblaj, sed ili vekas kaj vokas nin, ke ni decidu, kion fari, eĉ kontraŭ multaj el tiuj, kiuj ankaŭ nomas sin kristanoj kaj katolikoj......

Bojec Molodoj.



### Herooj de la Glacio.

**Per Balono al la Poluso de S. A. Andrée, Nils Strindberg kaj Knut Fraenkel,** Esperanto-traduko de Stellan Engholm, Fœrlagsfœreningen Esperanto, Stockholm 1930, 416 pĝ., broŝ. 11 sved. kr., bind. 12.50 kr.

Kun pli granda intereso ol romanon (ĉar la plej perfekta romano estas la vivo) vi legos la libron pri Andrée kaj liaj kamaradoj, kiuj antaŭ 33 jaroj en malforta balono riskis la veturon al la poluso kaj pereis kiel herooj de la scienco kaj esplorado en la norda glacio. En la centro de la verko troviĝas la taglibro de Andrée nur lastan someron retrovita. La libro samtempe eliris en multaj lingvoj, kaj ni ŝuldas grandan dankon al la Eldona Societo Esperanto en Stockholm, ke ĝi riskis Esperanto-eldonon, kiu laŭ eksteraj estas samvalora al la aliaj eldonoj kaj kies prezo eĉ estas malpli granda ol tiu de la plej gravaj nacilingvaj eldonoj. La traduko estas perfekta. La Esperantistoj aĉetu multnombre tiun libron, ĉar de ĝia sukceso sendube dependos, ĉu la aperigo de tiaj aktualaj verkoj en Esperanto samtempe kun nacilingvaj eldonoj fariĝos ĝenerala kutimo. La Andrée-libro estas aĉetebla de la plej grandaj Esperanto-librejoj (BEA, London; Heroldo, Kœln, Eana, Usono ktp).

## LIBROJ PRI LA MILITO

**Erich Maria Remarque, En Okcidento Nenio Nova,** Esperanto-Traduko, Heroldo de Esperanto. Libro-Fako, Kœln 1929, 252 pĝ., broŝ. 6.— RM. bind. 7,50 RM.

**Jakob Stab, Die Versuchung des Priesters Anton Berg,** nova eldono, Verlag Carolus-Druckerei, Frankfurt a/M., 1929, 180 pĝ., 4,80 RM.

**Joseph Menke, Ohne Waffe, Das Kriegserlebnis eines Priesters,** 7-a eld. Ferdinand Schœningh, Paderborn 1930, 287 pĝ., bind. 4.— RM.

**Joseph Wilke, Wehrlos.** Das Erlebnis einer Kriegsgefangenschaft, Schœningh, Paderborn 1930.

Pri la mondkonata libro de Remarque estiĝis akra disputo, kaj multaj kristanoj rifuzis la libron, ĉar ĝi estus nur negativsenca. Ankaŭ ni opinias, ke tiaj libroj nek sufiĉas por gajni definitivan ideon pri la milito nek por certigi la pacon. Ni pensas, ke la Remarque-libro por tiu celo ne estas sufiĉa, sed ni nepre jesas, ke ĝi estas necesa. La pacon ne konstruas tiuj, kiuj **timas** la terurojn de la milito, sed la kuraĝuloj, kiuj en pli forta heroeco ol tiu de la milito ŝanĝas la mondon. Rilate la pacon, la libro de Remarque ne estas la **semo**, sed la **plugilo,** kiu malfermas kaj solvas la grundon de la dormemo kaj nescio, tiu grundo poste ankoraŭ bezonas alian semon, por fariĝi pacifista en pli profunda senco, **tamen ni devas danki la pluginton!** Remarque ne skribis libron pri la herooj en la milito, sed pri la malfortaj homoj. Vere, ne ĉiuj estis tiaj, kiaj estas liaj figuroj, sed multegaj, eĉ la plej multaj! La Esperanto-traduko estas bona, ankaŭ la ekstera aranĝo. La libron bezonas ĉiuj niaj amikoj! Neniu alia libro, ankaŭ ne la du katolikaj de **Menke** kaj **Wilke** suprecititaj atingas ĝin en ĝia priskribo de la militrealeco. — Cetere la libro de **Menke** pri la sorto de pastro en la milito estas tre rekomendinda, en la libro de **Wilke** pri militkaptiteco enestas tendencoj, kiuj tute ne servas veran pacon. — La plej bona kaj plej profunda kristana libro pri la milito estas tiu de **Jakob Stab** (pseŭdonimo de la konata katolika pacifista politikisto Univ.-Prof. Fr. **Dessauer**), kiu jam dum la milito aperis en la katolika revuo « Hochland ». En ĝi la pastro Anton Berg elparolas la demandon pri la senco de la milito, kaj oni tremante sentas, ke la milito estas terura satanajo kaj ke ĝi devas esti superata el la spirito de Kristo. Ĉi tiu libro iras paŝon pluen ol la libro de Remarque — vi devus legi ambaŭ librojn !

## LIBROJ PRI LA PACO.

**Cease Firing, Fifty Pœms of the New Peace,** collected and arranged by **Anna Whittaker Roussel,** The John C. Winston Company, Philadelphia 1930, 104 pĝ., tolbind. 1 dol.

**N. C. W. C., Peace Statements of Recent Popes.** National Catholic Welfare Conference, Washington 1930, 12 pĝ., 0.10 dol.

**Lilian Stevenson, Réconciliation,** Préface de L. Ragaz, « La Réconciliation », 38, Av. Jean-Jaurès, Pantin (Seine) 1929, 208 pĝ., 10 fr. fr. (Angla eldono de 17 Red Lion Square, London WC 1; germana eldono de Wien VII, Dœblergasse 2/26, Aŭstrujo).

**Kaspar Mayr. Ist die Verstaendigung zwischen Polen und Deutschland unmœglich?** Versœhnungsbund, Wien VII., Dœblergasse 2/26, 1931, 56 pĝ., broŝ. 0.90 RM.

**Feliks G. Bochenski, Oboz Pokoju,** Przeglad Wspolczesny, Krakow 1931 16 pĝ.

50 poemojn por legado kaj recitado pri la « nova paco » kolektis **Anna Whittacker Roussel,** poetoj kiel John Galsworthy, Harry Emerson Fosdick, John Drinkwater ktp. troviĝas inter la aŭtoroj. La libro bone taŭgas por sia celo, kvankam komprenеble la literatura valoro de la poemoj estas tre malsama. La lastaj poemoj estas dediĉataj al la « Princo de la Paco »: Kristo. — La **usonaj katolikoj** bonege kunmetis en broŝureto diversajn elparolojn de la papoj Leono XIII-a, Benedikto XV-a kaj Pio XI-a pri milito kaj paco. Tia broŝureto devus en milionoj da ekzempleroj ĉiulingvaj esti disvastigata! — **L. Stevenson** rakontas al ni pri dekjara historio de la Internacia Frataro por Interpacigo, kiu vere modelan laboron faris por repacigi militintajn naciojn. Tiu frataro estiĝis el homoj, kiuj pro sia kristanismo dum la milito rifuzis preni armilojn kaj kiuj evoluigis admirindan heroecon de la paco. La libro estas pli intelecta ol romano! Ni ĝojas, ke ankaŭ MOKA estas en ĝi citata, kvankam ni devas protesteti, ke eu la franclingva eldono oni citas ĝin per ĝia germanlingva nomo. — Nia amiko **Kaspar Mayr ĝuste** en la nuna momento de la pliakrigo de la rilatoj inter Germanujo kaj Polujo eldonas necesegan broŝuron: Ĉu la interpaciĝo de Polujo kaj Germanujo estas neebla? Ĝin devas utiligi ĉiuj niaj germanaj amikoj kaj ankaŭ tiuj en Polujo, kiuj germanan lingvon komprenas. La libro estas pionira laboro de la paco! Sen polagermana interpacigo la mondpaco neniam estos certigata. — La saman altan celon servas pollingva broŝureto de Feliks Bochenski, kiu raportas pri la internacia junulara konferenco de Sromowce kaj uzas la okazon, por diri kelkajn tre atentindajn principajn vortojn.

## NOVAJ ESPERANTO-GAZETOJ.

**Katolika Vivo,** informiga gazeto internacia, 22, Cours Albert I-er, Paris VIII., duonmonata, jara abono kun monata E. K. por Francujo 30 fr. fr., por landoj kun rabata poŝttarifo (Stockholma konvencio) 35.— fr., por aliaj landoj 40.— fr.

La celo kaj enhavo de la nova gazeto ne multe diferencas de la antaŭa Katolika Mondo. La unuaj numeroj jam estis bonaj, kaj ni esperas, ke la gazeto fariĝos tre grava por la katolika vivo internacia. La redaktoro Pastro Georges Ramboux kaj nia redaktoro Wilhelm Solzbacher ankoraŭ intertraktos pri speciala kunlaboro, kaj W. Solzbacher jam dekomence montris sian pretecon, fariĝante korespondanta redaktoro de « Katolika Vivo ». En la sekvonta n-ro de «La Juna Batalanto» ni esperas sciigi pluan interkonsenton.

**Balkana Konkordo,** monata, ĉefredaktoro D-ro Zahari Zaharieff, Sofia, jarabono 80 levoj, Adr. P. K. 233.

Ekzistas malmultaj Esperanto-gazetoj, kiuj faras vere seriozan impreson. Des pli ni ĝojas pri Balkana Konkordo, kiu kuraĝe forlasas la tedan « neŭtralismon » de vastaj Esperantistaj rondoj kaj decideme servas la interamikiĝon de la balkanaj nacioj per informoj, reciproka konigo de la diversaj literaturoj ktp. La unuaj du numeroj estas bonegaj. Ni rekomendas la gazeton al seriozaj pacamikoj, kiuj komprenas la gravecon de la balkanaj problemoj. Sukcesan laboron.

**Literatura Mondo**, ĉefredaktoroj: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, Red. kaj adm. Bleier Vilmos, Boraros ter 6, Budapest IX., Jarabono 10 hung. pengoj.

La lukse arangita bonega litteratura revuo de Esperantujo denove komencis aperadi. Ĝi havas grandan kaj belan taskon. La unua numero estis tre interesa kaj promesas indan evoluiĝon.

**Iberia Esperantista Revuo,** Dir. Jaume Grau Casas, L. K., Diputacio 50, Barcelona, dumonata, jarabono 9 pes. aŭ 1 dol.

La unua (48-paĝa) numero montras, ke la revuo ĉefe serĉos sian taskon sur la literatura kampo, kie ĝi vere estas atentinda. Oni anoncas reaperon de la Kataluna Antologio kaj preparas nun ankaŭ « Hispanan Antologion ».

**UŜE-EHO,** « Libro », Str. Lonovici 1, Timisoara, Rumanujo, trimonata, jarabono : 4 afrankoj de eksterlanda letero.

La gazeto propagandas la ideon de Unuigitaj Statoj de Eŭropo. Bonaj estas la satiraj bildoj. La ĉefartikoloj diras nenion novan.